

# ĈEA-Retkomunikoj 2014/02



ĈEA-Retkomunikoj estas neregula informilo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio sendata al ĉiuj rete atingeblaj membroj de ĈEA kaj ankaŭ al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri la Esperanto-movado en Ĉeĥio. Ĝi neniam enhavas aldonaĵojn. Se vi tamen ne volas ricevadi ĝin, sufiĉas respondi per simpla "ne sendadu" kaj ni tuj eligos vin de la dissendolisto.

## ENHAVO:

1. VORTOJ DE LA ĈEFREDAKTORO
2. RETKOMUNIKOJ EN PDF-FORMATO
3. INVITO AL LA PLEJ PROKSIMAJ ARANĜOJ
4. VIZITU NEKUTIMAN EKSPOZICION EN VIENO
5. AKTUALAĴOJ EN WWW.ESPERANTO.CZ
6. MULTMEDIAJ INTERESAĴOJ
7. LISTO DE ARANĜOJ

## 1. VORTOJ DE LA ĈEFREDAKTORO

Jen la dua numero de ĈEA-Retkomunikoj en la jaro 2014. Kion vi trovos en ĝi? Krom la tradiciaj rubrikoj ankaŭ inviton al unu nekutima ekspozicio en Vieno. Kaj aldone ankaŭ invito por la tralego de interesaj prelegoj. Ĉu vi volas scii pli?

Do, agrablan legadon!

PS: Ŝparu la naturon - se eblas - ne printu tiun ĉi numeron de ĈEA-Retkomunikoj, se ne nepre necesas. Estu amiko de la naturo!



**Redaktoro Miroslav Hruška  
antaŭ la ekspozicio en Vieno**

## 2. RETKOMUNIKOJ EN PDF-FORMATO

Kiel tradicie, ankaŭ tiu ĉi numero de ĈEA-Retkomunikoj en PDF-formato elŝuteblas [ĈI TIE](#).

ARKIVO de Retkomunikoj troveblas [ĈI TIE](#).

### 3. INVITO AL LA PLEJ PROKSIMAJ ARANĜOJ

#### 3.1 La 18-a Esperanto-Tago en Pardubice - La 14-an de junio 2014

Asocio de Esperantistoj-Handikapuloj kaj Esperanto-Klubo de d-ro Schulhof invitas vin al unutaga renkontiĝo, kiu ĉi-jare okazos ekde la 10-a horo en Integra centro KOSATEC, str. Sladkovského 2824. Surprograme estas prezentiĝo de la loka koruso, prelego "Per Esperanto en la mondo" de Petro Chrdle, trarigardo de la integra centro, komuna tagmanĝo, parolado pri Maskerado kun Jindřiška Drahotová kaj pri Čapek kun Margit Türková, prezento "Kiel oni vivas en Vjetnamio kaj Kampuĉio" de Kvido Janík, novaĵoj el kluboj kaj muzikumado.



Preciza mapeto kaj kontaktoj troveblas ĉe ĉi tiu lingvo [ĉi tie](#).

Por ke la organizantoj sciu pri nombro de partoprenantoj, kaze de intereso (se vi ne jam faris) bv. nepre TUJ aliĝi ĉe [ah@esperanto-ah.eu](mailto:ah@esperanto-ah.eu). Nur aliĝintoj havas garantion de tagmanĝo!

#### 3.2 Internacia Montara Renkonto sur Granda Ĉantorio - la 15-an de junio 2014

Vi estas invitataj al longtradicia renkontiĝo de ĉeĥaj, slovakaj kaj polaj esperantistoj, en la regiono Gorolsko surlime de la tri landoj. La aranĝo estas kunordigata de la E-klubo en Ostrava. La mistera monto Granda Ĉantorio (Velká Čantoryje), alinomata ankaŭ kiel "la silezia Blaník", situas proksime al Nýdek kaj pola urbeto Ustroń Polana troviĝanta apud Bielsko-Biała. Al la montopinto eblas grimpi perpiede, biciklante aŭ (de pola flanko el Ustroń Polana) veturi per seĝa telfero / kablotramo. Surmonte oni povas viziti belvidan turon, ĝui somerajn sledojn kaj tiel nomatan simio-arbetaron, observi flugadon de trejnitaj falkoj, babiladi. Eblas tranoktado kaj vespera bivakfajro kun rostado kaj kantado. Pliaj informoj, fotoĵoj a filmetoj troviĝas [ĉi tie](#).



Kontakto por aliĝo kaj detalaj organizaj informoj (inkl. tranokteblecojn) skribu al [suchanekj@seznam.cz](mailto:suchanekj@seznam.cz)

### 4. VIZITU NEKUTIMAN EKSPOZICION EN VIENO!

Ankoraŭ ĝis la 15-a de junio vi povas viziti en Vieno nekutiman ekspozicion kun nomo "Domo de eŭropa historio en ekzilo". La ekspozicio antaŭe estis jam en Bruselo, sed nuntempe okaze de Vienaj festotagoj vi havas ŝancon viziti tiun ĉi ekspozicion en urbo pli proksima al Ĉeĥio.

Aŭtoro de ekspozicio, Thomas Bellinck, en ĝi prezentas Eŭropan Union el vidpunkto de la jaro 2060, kiel historiaĵon fiaskintan jam en 2018. Interese estas, ke kvankam li ne estas eŭropskeptikulo, kelkaj el liaj prognozoj pri la estonteco jam realiĝis. Menciindas, ke ĉiuj priskriboj estas en Esperanto kaj nur plej gravaj tekstoj estas ankaŭ en la angla, germana kaj franca lingvoj. Iu futura formo de Esperanto estas lingvo uzata de la eŭronostalguloj, kiuj reinstalis la muzeon en la dua intermondmilita periodo. La aŭtoro ja mem ne parolas Esperanton kaj ne kunlaboris je tradukoj kun Esperantistoj, do la esperanta teksto foje estas iom malpli kvalita pro la maŝina traduko de Guglo. Tamen, kiom ofte vi havas ŝancon viziti viziti per Esperanto ekspozicion pri aktuala temo, kiu estas tiom granda kaj tamen kreita de ne-Esperantisto? Aldone, eble vi bonŝancos kaj renkontiĝos persone ankaŭ kun la aŭtoro, same kiel mi sukcesis dum vizito de tiu ĉi ekspozicio kun Marek Blahuš.

La ekspozicion eblas ankoraŭ viziti de merkredo ĝis dimanĉo (do de la 11-a ĝis la 15-a de junio), dum labortagoj la ekspozicio estas malfermita de la 15-a horo ĝis la 20-a horo kaj dum semajnfino de la 11-a horo ĝis la 20-a horo (lasta eniro ebla ĉiam je 18:30).

Se vi ne volas atendi por eniri la ekspozicion, prefere anticipu rezervu tempon telefone.

La ekspoziciejo situas en strato Postgasse 10, ne for de la Stefana Katedralo. Enirkozito 10 €, eblas peti rabaton por studentoj kaj homoj super 60 jaroj.

Detalaj informoj pri la ekspozicio en la germana lingvo [ĉi tie](#) kaj en la angla lingvo [ĉi tie](#).

Intervjuon kun la aŭtoro vi povas legi [ĉi tie](#).



Ekzemplo de direktivo prezentata en la ekspozicio

## 5. AKTUALAĴOJ EN WWW.ESPERANTO.CZ

Ni invitas vin al regulaj vizitoj ĉe <http://www.esperanto.cz/eo/aktuality> kaj informas vin pri la novaj artikoloj el la lastaj semajnoj:

### Artikoloj en esperanto en [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz)

#### [Interesaj prelegoj en retejo de E-klubo en Brno](#)



es

Ke en Brno, la dua plej granda urbo de Ĉeĥio, estas Esperantista klubo en Brno kaj Societo por la internacia lingvo Esperanto en Brno, tio ŝajne estas bone konata. Sed ĉu vi sciis, ke ambaŭ kluboj komune publikigas multajn prelegojn, kiuj okazis en la klubejoj? Hodiaŭ ni ŝatus prezenti al vi kelkajn el ili.

#### [Jan Fidel Řepa solenis sian vivjubileon](#)

Konata ĉeĥa esperantisto kaj amatora aktoro Jan Řepa (konata sub la kromnomo Fidel) el sudbohemia urbeto Netolice, la 14-an de majo 2014 solenis sian 70-an naskiĝtagon. Nia redakcio kaj ĈEA elkore gratulas kaj omaĝe al li alportas al vi plurajn beletrajn sonregistraĵojn kaj mallongajn filmojn, al kiu li „pruntedonis“ sian voĉon.







### [Novaĵoj en Verda Stacio kaj en E-Retradio 2014/2](#)

Jen invito al interesaj aktualaĵoj en la du menciitaj gravaj retejoj.

### [Nova interreta projekto de E@I - Bonan Apetiton](#)

Per tiu ĉi novaĵo ni volus al vi, vizitantoj de tiu ĉi retejo, prezenti novan interretan projekton de internacia organizo E@I – Bonan Apetiton.



### [Forpasis Zdeněk Hršel](#)

Honora membro de ĈEA kaj honora prezidanto de Esperantista klubo en Brno Zdeněk Hršel forpasis la 3-an de junio 2014.

### [Nur ĉeĥlingvaj artikoloj:](#)

#### [Okénko do historie - Eduard Kühnl](#)

(Fenestro en historion - Eduard Kühnl)



16. května 2014 uplynulo 130 let od narození diplomata Eduarda Kühnla, jednoho z klíčových průkopníků esperantského hnutí v českých zemích. Připomeňme si při této příležitosti několik zajímavých faktů z jeho čínorodého života.

#### [Nabídka nové knihy](#)

(Oferto de nova libro)



Ing. Jan Werner zpracoval česky knihu „Tvorba slov v esperantu“ podle „Plena Analiza Gramatiko“ od K. Kalocsaye a G. Waringhiena. Knihu je možno získat se slevou za 85 Kč v subskripci do 31. května 2014.

#### [České vize Evropy?](#)

(Ĉeĥaj vizioj de Eŭropo?)



Aneb „Manuál k naší evropské debatě“ – tak zní celý název mimořádné publikace, kterou právě vydalo nakladatelství Academia. Prezentace čtyřsetstránkové knihy se uskutečnila 28. 4. 2014 v Poslanecké sněmovně PČR v rámci konference „Evropská unie, Česko a Slovensko: společná bezpečnostní budoucnost“. Jedním ze spoluautorů je i dr. Max Kašparů, který přispěl pozoruhodnou esejí nazvanou „Evropa – krize lamp a devatero budoucího času“. Její závěrečná část je věnována otázkám jazykové politiky v EU a možné úloze esperanta v rámci Evropy.

#### [Počítačová poradna - Letecká pošta](#)

(Komputila konsultejo - Letecká pošta)



Už jste se setkali s tím, že jste potřebovali odeslat někomu větší soubor, jehož velikost přesahovala maximální velikost povolenou poskytovatelem e-mailu? Nebo naopak jste zjistili, že jste sice e-mail poslali, ale příjemce e-mail neobdržel, protože mu příliš velký soubor zaplnil schránku a proto nemohl být doručen příjemci? Pro tyto případy se hodí poslat soubor jinou cestou, například pomocí služby „Letecká pošta“.



#### [Esperanto v českých médiích](#)

(Esperanto en ĉeĥaj medioj)

Přinášíme vám několik novinek z uplynulých dvou měsíců – nejen odkazy na zajímavé články, ale i pozvánku k poslechu rozhlasového interview.

## 6. MULTMEDIAJ INTERESAĴOJ

### 6.1 SONREGISTRAĴOJ



La unuaj registraĵoj el la 9-a Sabla Printempo en Skokovy

[Tomáš Masaryk kaj Charlotte Garrigue](#) - artikolon de Jindřich Ondráček laŭtlegas Jan Markovič

[Kvin hazardoj, kiuj produktis de mi ĝisostan esperantiston](#) - propran rakonton laŭtlegas Petr Chrdle

La ceteraj registraĵoj estas prilaborataj kaj estos publikigitaj en la sekva numero de Retkomunikoj.

Omaĝe al 70jara datreveno de forpaso de la [ĉeĥa profesoro Štěpán Urban \(1913-1974\)](#)

[Ŝtefo Urban - Spegulo \(poemo\)](#) - laŭtlegas Miroslav Smyčka

[Ŝtefo Urban - Atlantis](#) - laŭtlegas Miroslav Smyčka



### 6.2 VIDEOJ

[Cusco - la centro de Inkaa imperio](#)

[Fama hispana kantistino María Villalón - "La pluvo"](#)

[Esperanto-Muzeo en Ĉinio](#)

[Tago de la Tero- Estu vi la plus-faktoro!](#) - ekologia animacia video

[Ekspoziciaj projektoj en Ĉeĥio](#)

La plej novaj filmĵurnaloj de Verda Stacio

[Numero 5 - pri Internacia E-Renkontiĝo de Meditado en Suda Koreio, pri prezentiĝo de Verda Stacio dum reprezenta firmaa vespero en Nový Jičín kaj pri Esperanto-rondeto en Šumice](#)

[Numero 6 - pri Somera Esperanto-Studado en Nitra](#)


Rekomendataj filmo pri instruado de Esperanto (el Youtube)

[Oficiala instruado de Esperanto - Katalin Kovats](#)

[Esperanto en la Universitato de Amsterdamo](#)

[Stefan MacGill: Esperanto etape - prelego dum la instruista trejnado en Poznan, septembro 2013](#)

## 7. LISTO DE ARANĜOJ



2014-06-14 [La 18-a Esperanta tago en Pardubice](#) Info: [pardubice@esperanto.cz](mailto:pardubice@esperanto.cz)

2014-06/15 [Grimpado al Granda Ĉantorio](#) - Info: [leontodo@centrum.cz](mailto:leontodo@centrum.cz)

2014-07-12/20: [Somera Esperanto-Studado en Nitra](#)

2014-07-13/26 [Dua etapo de SET Lančov](#)

2014-07-27/08-08 [Tria etapo de SET Lančov](#)

2014-08-08/10 [Renkonto de ekstendaranoj en SET Lančov](#) Info: [let.lancov@seznam.cz](mailto:let.lancov@seznam.cz)

2014-08-09 [La 2-a E-mentala pikniko en Saksa Svislando](#)

2014-09-06 [La 3-a E-mentala pikniko en Saksa Svislando](#)

2014-09-12/14 [Renkontiĝo de ĉeĥa IKUE-sekcio en Svatý Kopeček ĉe Olomouc](#) - Info: [m.svacek@seznam.cz](mailto:m.svacek@seznam.cz)

2014-09-20 [Postferia Renkontiĝo en Strž apud Dobříš](#) - Info: [pisek@esperanto.cz](mailto:pisek@esperanto.cz)

2014-09-25/28 [Regiona filatela ekspozicio kun salono de Esperanto](#)

2014-09-27/28 [Inaŭguro de la ekspozicio "Esperanto kaj kolektado", Tutŝtata filatela ekspozicio + Kleriga dimanĉo en Svitavy](#) - Info: [svitavy@esperanto.cz](mailto:svitavy@esperanto.cz)

2014-10-24/26 [ĈEA-Kongreso en Prostějov](#) - Info: [cea@esperanto.cz](mailto:cea@esperanto.cz)

2014-10-30/11-02 [3-a Internacia Esperanto-Lernejo en Bartošovice](#) Info: [verdestacio@gmail.com](mailto:verdestacio@gmail.com)

2014-11-07/09 [Brila Internacia Esperanto Renkontiĝo en Poděbrady](#)

2014-11-13/16 [Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko \(KAEST\)](#), info: <http://kaest.ikso.net/>

2014-11-29 [Antaŭkristnaska Renkontiĝo en Písek](#) - Info: [pisek@esperanto.cz](mailto:pisek@esperanto.cz)

2014-12-13 [Marcipana Kristnasko en Svitavy](#) Info: [svitavy@esperanto.cz](mailto:svitavy@esperanto.cz)

Ĉu vi ne trovis vian aranĝon ĉi tie? Ne kulpigu nin, sed sendu la informon pri ĝi al [retkomunikoj@esperanto.cz](mailto:retkomunikoj@esperanto.cz). Ne eblas envicigi aranĝon, pri kiu ni ne scias.

ĈEA-Retkomunikoj 2014/02

Kontakto kun ĉefredaktoro: Miroslav Hruška – [retkomunikoj@esperanto.cz](mailto:retkomunikoj@esperanto.cz)

Redakta teamo: Petr Chrdle, Pavla Dvořáková, Marek Blahuš